

# esperanto USA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(4)

## Making News This Issue

### High Finance, Revisited

Some further editorial cogitations about financing ELNA. Is ELNA on the financial hot seat, or are we sitting pretty? And does "sitting pretty" mean the same thing as "resting on our laurels?"

See Page 2

### How Are We Doing?

Every year, the Director of the Central Office prepares a report on the status of ELNA and its progress during the preceding year. Here's a preview of this year's report.

See Page 5

### A Riddle Wrapped in an Enigma

Nikolai Stepanov gives us an exclusive overview of the fascinating history of the Esperanto movement in the USSR, now emerging from decades of near-silence.

See Pages 7-9

#### In This Issue:

Lots of Letters 10-12

All-California Esperanto Conference 13

Stub Your Toe on Language Recently? Join the Crowd! 15

And Much, Much More to  
Delight and Inform You!

## Quote of the Month

### The Value of Esperanto

[Justice Keppel Enderby, a former Australian government minister and attorney-general, will be coming with Mrs. Enderby to the Esperanto courses at San Francisco State University this July. Here are some excerpts from a recent address to the Supreme Court of New South Wales.]

Recently I heard from a young Japanese Esperantist who had just returned to Japan after completing a two-year term in Australia doing post-graduate scientific work. Before his return he lunched with me and another Esperantist in my chambers. Writing in beautiful Esperanto, he described very eloquently his thoughts, how he could not escape feeling a for-


eigner during his stay in Australia, even though he had quite a useful capacity to express himself in English. He contrasted those feelings with his total absence of any feeling of "foreignness" when he was in the company of Esperantists. Esperanto somehow made him feel a little less Japanese and Australians a little less Australian. His letter was very moving.

Despite Esperanto's advantages and despite the world's need for it, its progress will probably continue at least for the foreseeable future to be a progress of slow growth. But the Esperantists ... will continue their unique form of access

daŭrigo sur paĝo 5

|                      |      |      |
|----------------------|------|------|
| Our goal for 1991... | 1150 |      |
| ELNA Membership 1990 | 1031 | 1000 |
| ELNA Membership 1989 | 931  |      |
| ELNA Membership 1988 | 778  |      |
| ELNA Membership 1987 | 572  | 500  |

**Membership 1058  
on May 31!**



# EDITORIAL

## EVEN HIGHER FINANCE

A couple of issues ago I raised some questions about long-term structural problems in the financing of ELNA. I did not expect a firestorm of response from the membership, and I was not disappointed. You can see the results in this issue's letter column. I'd particularly like to thank Ed Harler for his short but very positive reply.

From some verbal conversations I've had, it's become apparent to me that I didn't stress the *long-term* nature of these structural deficiencies strongly enough. Nor did I point out that their danger applies to a financially static organization, not necessarily to one that is financially *dynamic*.

How long-term is *long-term*? In his letter, Jonathan Pool mentions that ELNA is now a "half-million-dollar organization." This is an exaggeration, but not much of one. So if ELNA were to run a \$10,000 deficit every year for the foreseeable future, a rather simple-minded calculation will show that the organization would go broke in about half a century. A more realistic calculation, taking both inflation and declining interest income into account, would reduce that figure to about twenty years.

Which is all very hypothetical. ELNA is not running \$10,000 deficits. I haven't seen the final figures for fiscal 1991 yet—ELNA's fiscal year will end two days from now, as I write these words, and the final figures will only be available in time for the Congress in Raleigh—but as far as I can tell we're walking a tightrope between a small surplus and a small deficit. Which, for a non-profit organization, is as it should be.

Still, there will be inflation; few people today stop to think that the level of inflation of which the last two administrations have been so proud is the same one that panicked President Nixon into imposing short-lived wage-price controls in 1971. And eventually, without growth of our capital, our extra interest income will not cover our costs. Which leads us to the difference between a financially static and a financially dynamic organization.

A couple of years ago, a guest editorial in the magazine *Analog Science Fact—Science Fiction* described the attractions

of relativistic interstellar flight to the financially astute astronaut. Just stick your money in the bank, said the author, hop aboard a light-speed spacecraft, and, because of the time-contraction effect, you return a hundred years later, no older, to a capital that has pyramided because of compound interest. You end up rich and still young enough to enjoy it.

My reply, which was published, was that the rich don't get that way by letting interest pile up; inflation eats it up as fast as it accrues, until the whole system runs into an economic discontinuity such as the Great Depression and your entire capital gets gobbled up by a bank or S&L failure. The rich get that way by dynamically adding to their capital in a number of different ways—creating new wealth, selling junk bonds, sinking money in risky short-term but potentially high-yield investments.

ELNA is not terribly dynamic, financially speaking, but neither is it static. A decade ago ELNA was hobbling along with a capital of about \$40,000, if I remember correctly—less than the annual income of many of its members. Today, thanks largely to a legacy from Ella Gibson and also to a gift from John Massey, that capital has been multiplied tenfold. Furthermore, ELNA's members have shown great willingness to open their pocketbooks for programs with specific goals. The Steve Allen-Bill Harmon promotional videotape cost, if I remember correctly, some \$10,000 to produce; it was financed with donations. And then, only two or three years later, the original publication of the Richardson book (now in its second edition) was similarly financed by the membership. Most recently, a very limited campaign by Prof. Ron Glossop of Southern Illinois University (Edwardsville) to obtain funding for participation by a group of Hungarian Esperanto-speaking children in an international conference on gifted and talented education netted almost \$2,000—enough to pay for the journey for the entire class and, perhaps, create some interest in Esperanto among teachers of the gifted around the world.

I firmly believe that, with more than a thousand members, many of whom have

already shown themselves more than generous as far as Esperanto is concerned, over the next decade or so any losses we may suffer because of inflationary attrition will be more than made up—far more than made up!—through new influxes of capital.

Of course, we have to remember that "financially dynamic" is just a subcategory of "dynamic," unqualified. In his letter, Jonathan Pool suggests that ELNA is not dynamic enough; "we're not ... undertaking [bold protests, tough negotiations, and grand designs]." He is right. ELNA continues as it always has—providing its newsletter and a few other services to the members, selling books, answering information requests. Its budget does not permit it to do more. Example: it would be very nice to have display booths at this year's conferences of both the Modern Languages Association (San Francisco) and the American Council on Foreign Language Teaching (Washington)—and at conferences in future years. Showing the flag at the second organization might well have significant results in the foreign-language-teaching community some years down the road; a booth at the first would complement and support the work that members of the American Association of Teachers of Esperanto and the Esperanto Studies Association are already doing with their annual Esperanto seminar at the conference (and might help avoid the sort of negative publicity we received from last year's MLA meeting). But such booths cost on the order of a thousand dollars each; and ELNA simply doesn't have the extra money to budget for such matters without dipping into its capital. Publication of Dr. Peter Benson's *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* falls into the same category: something we ought to be doing, but for which nobody has seemed to be willing to allocate the necessary up-front money.

My own feeling is that "financial dynamism" will follow as a corollary of a more generally dynamic approach to promoting Esperanto, even if that approach involves some initial financial investment in the movement. Does anybody out there agree with me?

Don Harlow

# NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

Geoffrey Tomb, Staff Writer for the Miami, FL, *Herald* (Mar. 9, 1991), claims about Esperanto that “‘Universal’ language is a far cry from that” in an article that, despite interviews with Esperantists Rel Davis and Sergio Docal, is less than enthusiastic. Tomb mentions Esperanto’s 19th-century beginnings, but with respect to the 20th century concentrates on the relatively few Esperanto speakers in Florida, ignoring, for instance, the very large number of Esperantists only 90 miles away... (sent by Sergio Docal)

An Associated Press story, published by the Baltimore *Evening Sun* (Apr. 4, 1991), mentions the Norwich Jubilee Esperanto Foundation of Oxford, England, as one of the more unusual sources of available scholarships. (sent by Clarence Morey)

In a letter to the editor of the Oakland, CA, *Tribune* (Apr. 19, 1991), in response to a column on the upsurge of “tribalism” in the modern world, Donald J. Harlow mentions the Esperanto Club of Cluj-Napoca, Romania, as an example of “intertribal” cooperation, and that Club’s sister-group relationship with the League of East-Bay Esperantists.

*The Christian Century* (Apr. 24, 1991) carried an editorial by Martin E. Marty titled “Universally Particular,” in which Mr. Marty draws an analogy between the lack of interest in Esperanto shown by the members of the Modern Language Association, and the lack of interest in what he calls Cosmic Metaphysics. (sent by Gerard Capdevielle)

National Public Radio’s *All Things Considered* broadcast a report segment (Apr. 29, 1991) in which their reporter in Vienna interviewed people on the street about Esperanto, as well as Herbert Mayer of the Internacia Esperanto-Muzeo Wien, and concluded that no one speaks Esperanto and that English is the world language—although all interviews were conducted in German, except for one with an American tourist and...the

one with Herbert Mayer. (reported by Angela Harlow and Edna Stein)

James Collins, in an article in *Spy* magazine, reprinted in the San Francisco, CA, *Chronicle* (May 2, 1991), mentions Esperanto as one of a list of “great lapses of common sense through history.” (sent by Maya Kennedy)

Lawrence Toppman compares attendance at various parts of the Charlotte Film and Video Festival to “an Esperanto convention in South Dakota” in an article in the Charlotte, NC, *Observer* (May 3, 1991). (sent by Annette Greenland)

A letter by Donald J. Harlow to the San Francisco, CA, *Chronicle* (May 14, 1991) answers the comment by James Collins in the article mentioned above.

“El Esperanto ¿un nuevo resurgir?” es el título de un artículo muy bien escrito, que apareció en el número 1991/1 de *El Sol*, Revista Oficial de la Asociación de Maestro de Puerto Rico. En el artículo, escrito por el Dr. Tomás Sarramía, se describieron los temas “Qué es el esperanto?”, “El Dr. Zamenhof: apunte biográfico”, “Deseo de un idioma universal”, “Composición y antecedentes”, y “Actualidad del esperanto”. (enviado por Tomás Sarramía)

“The dangerous language: Loving beyond boundaries” is a full-page article by T. Geller about the gay Esperanto movement which appeared in the Cincinnati, OH, monthly *Nouveau Midwest*. Geller describes activity among gay Esperantists both abroad and in the United States. Sidebars give examples of gay terminology in Esperanto, constructed strictly from traditional roots, and addresses for ELNA and the Ligo de Samseksamulaj Esperantistoj. (sent by T. Geller)

From John L. Munschauer, in *Jobs for English Majors and Other Smart People*, chap. 7, “Brainstorming for Unusual Careers”: “Could you, by chance, become interested in Esperanto, the universal language? There are people who believe that

establishing a single language for everyone would avert worldwide misunderstandings and who have made the promotion of Esperanto their lifework.” (reported by Gerard Capdevielle)

*Transition Mathematics*, a Scott, Foresman book from the U. of Chicago School Mathematics Project, asks the student on p. 144: “What is, or was, Esperanto?” According to Gerard Capdevielle, who advised us of this: “This elated my niece, because a few months before this I began teaching her Esperanto. Now the whole class knows about it.” (reported by Gerard Capdevielle)

## KOREKTOJ PRI LA ADRESARO

Pro komputila eraro en la C.O., du gravaj nomoj estis senintence ellasitaj el la listo de Dumvivaj Membroj de ELNA en la Listo de Membroj por 1991. La du mankantaj nomoj estas:

**Armin Doneis Sr.  
Conrad Fisher**

S-ano Doneis dum multaj jaroj estis Estrarano de ELNA, kaj ankaŭ Ĉefdelegito de UEA. S-ano Fisher estis Sekretario de ELNA dum pluraj jaroj, kaj lastatempe postenas en la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo. Pro siaj gravaj kontribuoj al la Esperantomovado en nia lando dum multaj jaroj, ambaŭ samideanoj estas jam delonge Honoraj Membroj de la Ligo, krom tio, ke ili ankaŭ pagis al ĝi la kotizon por Dumviva Membreco. Al tiuj du honorindaj esperantistoj, ni sincere pardonpetas.



# REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

## CALIFORNIA

La 24a Tut-Kalifornia Konferenco ("TKEK") okazis en bela Santa Barbara inter la 5a kaj 7a de aprilo 1991 kun 42 partoprenantoj. La temo "Esperanto en ŝanĝiganta mondo" evoluis per ses apartaj prelegoj/diskutadoj kun la subtemoj "science", "infaneduke", "lingve", "geografie kaj movade", "literature", kaj "reklame. Pli plenan raporton oni trovas aliloke en ĉi tiu numero. (komenco de raporto de William R. Harmon, el *La Orient-Ekspreso*, majo 1991)

Inter la 10a kaj 12a de majo 20 esperantistoj el la golfa regiono kunvenis ĉe la YMCA Point Bonita, en la Terkapo Marin, por festi la 12an Nordkalifornian Senkrokodiligan Semajnfino. La temo de la semajnfino estis "La Esperanta Gazetaro." Ionel Onet paroladis pri "Mortintaj sed senmortaj" literaturaj revuoj el la pasinteco; Don Coleman raportis siajn esplorojn pri lokaj klubaj bultenoj en Usono; Don Harlow diskutis eble 20 malmulte legatajn Esperanto-revuojn. En la vespero de la 11a oni prezentis mem-verkitajn skeĉojn, el kiuj la plej trafa estis tiu de la sinjorinoj: "Grupo da virinoj starigas edz-perantan organizon per Esperanto."

## DISTRICT OF COLUMBIA

Maje gastis ĉe la Esperanto-Societo de Vaŝingtono Jadwiga Greger el Pollando, kiu jam pasigis kelkajn semajnojn en Usono sub la aŭspicio de konferenco organizita de la usona Departemento de Laboro, pri la rolo de virinoj en la t.n. Tria Mondo (la usona registaro evidente konsideras Pollandon "triamonda" lando). Oni invitis reprezentantojn de registaroj, privataj entreprenoj, kaj laborsindikatoj, kaj Greger reprezentis la nun mondfaman polan sindikaton "Solidareco". La principo estis, interŝanĝi ideojn, sed Greger raportis, ke la usonaj delegitinoj tro parolis kaj tro malmulte aŭskultis la eksterlandajn gastojn. La usonaninoj, ŝi diris, emis trudi siajn ideojn pri "virina liberiĝo" al la delegitinoj de aliaj landoj kie la aspiroj de

virinoj ne similas tiujn de Usono. La ESV montris al Greger diversajn vidindaĵojn de Vaŝingtono, ankaŭ la kvartalojn Adams-Morgan kaj Mt. Pleasant tuj post la tumultoj en tiuj kvartaloj. (raporto el *La Potomaka Esperantisto*, majo 1991)

Por la tria jaro Esperanto estis parto de la programo de la Plirapidigita Instrusistemo ĉe la elementa lernejo H.D. Cooke en Adams-Morgan. Mastrumas la programon Linda Satterthwaite kaj partoprenas 30 infanoj 10- ĝis 12-jaraj. D-ro Martha Flores volontulas dufoje semajne por instrui Esperanto. Tiun ĉi jaron la infanoj ankaŭ esploris pri landoj ĉirkaŭ la mondo kaj fremdaj kulturoj. Vizitis la klason en marto Timothy Ryan, kiu instruis al la infanoj pri Japanio kaj kiel skribi siajn nomojn kaj saluti unu la alian japanlingve. Emanuel Goutier, esperantisto el Haitio, pridiskutis sian landon kun la infanoj, li ankaŭ instruis kelkajn francajn vortojn. Ankaŭ Edward Peck, antaŭa usona ambasadoro al Maŭritanio, kaj Detlev Busch, germana kuracisto, vizitis la klason. Satterthwaite, kiu ricevis premion de la Publika Lerneja Sistemo de D.C. pro la programo, jam planas por la venonta jaro. La respondeculoj volas danki la lokajn esperantistojn kiuj subtenis ilin, inkluzive de Ed Ledzinski kaj Pilar Solis. Ili ankaŭ volas danki al Charlotte Kohrs el Kalifornio, estro de "Infanoj ĉirkaŭ la mondon", kiu sendis studmaterialojn, kaj Bonnie Parsons el Norda Karolino, kiu helpis plani kelkajn lecionojn. (raportis Martha Flores en *La Potomaka Esperantisto*, majo 1991)

## NEW YORK

La 14an de decembro 1990, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED) kaj la Traduka Fakoj de UNO prezentis la 9an Konferencon pri Lingvo kaj Komunikado ĉe 777 UN Plaza. Dek unu parolantoj prelegis pri Content Analysis in International Perspective. La prelegoj, ĉiuj en la angla lingvo, estis interesaj kaj tuŝis multajn flankojn de la konferenca temo. Proksimume sesdek personoj partoprenis

la konferencon. La novjorka oficejo de UEA havis tablon en la konferenca salono kie oni povis trovi dokumentojn de CED kaj informon pri Esperanto. (laŭ raporto de Jim Medrano en *Novjorka Prismo*, Jan. 1991)

La 14an de decembro 1990 proksimume 40 personoj festis la naskiĝtagon de L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Oni kunvenis en la Dag Hammarskjöld Salono sur la 12a etaĝo de 777 UN Plaza, de kie oni povis vidi panoramon de la Orienta Rivero kaj la UN-komplekson. D-ro Julius Manson paroladis pri la vivo de Zamenhof kaj rekomendis librojn. Li ankaŭ parolis pri persekutitaj esperantistoj afrikaj kaj pri rezolucioj de UNESCO pri Esperanto. Poste oni babiladis dum pli ol unu horo kaj kantis Esperante. Jim Medrano vidbendigis la feston, la paroladon de Julius Manson, kaj la gastojn kiujn intervjuis Nijl Blonstein. (laŭ raporto de Thomas Eccardt en *Novjorka Prismo*, Jan. 1991)

La UEA Novjorka Oficejo kaj la Novjorka grupo dissendas al diversaj instancoj, okaze de la Monda Tago de Sano (7a de aprilo) leteron kune kun la letero de d-ro Julius Manson, kiu aperis en la *New York Times* la 21an de januaro, 1989, pri problemo de interpretistoj okaze de la armenia tertremo. (raportis Rochelle Grossman)

Je la 74a datreveno de la forpaso de d-ro Zamenhof, dimanĉe la 14an de aprilo, Jack Burwell, ano de la Esperanto-Societo de Novjorko, paroladis pri "Language... Auxiliary Language... Esperanto" ĉe la Wilhelm-Bahaejo en Teaneck, NJ. La 90-minuta prezento estis parto de daŭra serio de ĉiusemajnaj klasoj por plenkreskuloj pri temoj rilataj kun la principoj de Bahaismo, ekz. la bezono por internacia helplingvo. Entuziasma reago rezultigis kelkajn petojn el la aŭskultantaro, ke oni venontjare paroladu pri la sama temo, kaj petojn, ke oni trovu instruiston kaj starigu Esperanto-kurson en la apudnovjorka regiono de New Jersey. (el *Novjorka Prismo*, majo 1991)

# EL LA CENTRA OFICEJO

## Kelkaj Rimakroj pri la Fiska Jaro 1990-1991

ELNA nun eniras novan fiskan jaron. Ĉiujare je ĉi tiu tempo la Direktoro de la Centra Oficejo, samkiel ĉiuj komisiitoj, devas prepari raporton por la Estraro kaj Kongreso de ELNA pri okazintaĵoj dum la pasintaj dek-du monatoj. En ĉi tiu artikolo mi mallonge diskutos unu-du statistikojn menciitajn en tiu raporto, plus aliajn kiujn vi eble trovos interesaj.

### Membroj

Mi unue donu statistikojn pri la nombro de membroj. Je la 15a de junio pasintjare, kiam la tiama Direktoro preparis sian raporton, ELNA havis 1014 membrojn. Ĉi-jare, je la unua de junio, ELNA havis 1056 membrojn. Jen la ciferoj por 1991 ĝis nun:

|            |         |      |
|------------|---------|------|
| Individuaj | membroj | 555  |
| 65+        | "       | 220  |
| Junulaj    | "       | 124  |
| Dumvivaj/  | "       | 116  |
| Honoraj    |         |      |
| Familiaj   | "       | 29   |
| Subtenaj   | "       | 14   |
| Sumo       |         | 1058 |

ELNA gajnis 215 novajn membrojn en 1991.

(Rimarkindas, ke ELNA havas 124 gejunulajn membrojn. Ĉu iuj el tiuj junaj membroj volas restarigi la gejunulan sekcion de ELNA?)

La speciala kategorio "Friend of Esperanto" estas en sia dua jaro. La nombro de "Friends" estas preskaŭ la sama kiel pasintjare—ĝis nun 63 en 1991, kompare kun 70 en 1990. Kvankam tio estas malgajno, ni certe gajnos pli da "Friends" dum la venontaj semajnoj. Cetere, ĉi tiu kategorio estas sukcesa. Pluraj "Friends" de 1990 fariĝis membroj, kaj pluraj renovigis siajn membrecojn kiel "Friends".

### Abonoj

Abonoj kreskegis dum la pasinta jaro,

eble pro la fakto, ke la antaŭa Direktoro kreis pli allogan informilon pri abonoj, kaj ankaŭ metis abonilon sur la ELNA/UEA-an aliĝilon. Ankaŭ mendoj de *La Jaro* kreskegis (pasintjare 38, ĉi-jare 150) pro la samaj kialoj, kaj ĉar ĝi estis reklamita en *ELNA Update*. Jen la 10 plej popularaj Esperantaj gazetoj por membroj de ELNA kaj la nombroj da membroj kiuj abonas ilin:

|                             |     |
|-----------------------------|-----|
| <i>Esperanto</i>            | 294 |
| <i>Monato</i>               | 116 |
| <i>El Popola Ĉinio</i>      | 102 |
| <i>Heroldo de Esperanto</i> | 85  |
| <i>Juna Amiko</i>           | 72  |
| <i>Kontakto</i>             | 46  |
| <i>Fonto</i>                | 43  |
| <i>Brita Esperantisto</i>   | 40  |
| <i>Scienca Revuo</i>        | 38  |
| <i>Lingva</i>               | 33  |

Entute, krom mendoj de *La Jaro*, la nombro de abonoj por ĉiuj gazetoj estas 904 por 1991. Pasintjare la nombro estis nur 515. Tio montras, kompreneble, ke multaj membroj de ELNA almenaŭ legas Esperanton sufiĉe bone por ĝui Esperantan gazeton. Kaj espereble tiuj abonantoj sentas sin—almenaŭ iomete—parto de la internacia Esperanta kulturo.

Ni verŝajne ofertas la samajn gazetojn ankaŭ en 1992, escepte de *Budapeŝta Informilo* (nun *Hungara Informilo*). Ni esperas oferti unu-du novajn gazetojn.

### Malgajnoj

En du sferoj ELNA iom malgajnis. Libraj mendoj iom falis. Kial? Eble ĉar la libro-katalogo aperis iom malfrue, kaj aparta listo de lernolibroj ne aperis ĝis aprilo. Fakte, libraj mendoj en majo estis tre bonaj.

Informpetoj ankaŭ falis. En 1990 la Centra Oficejo ricevis 2399 petojn por informo pri Esperanto, sed en 1991 ĝis nun nur 1483. Tio ne estas bona, kiel mi

menciis en mia lasta artikolo. Unu el la plej gravaj taskoj por la CO en la venonta jaro estos interesigi pli da homoj pri Esperanto.

Cathy Schulze memorigis al mi pri unu rimedo por tion fari. Kiel ŝi diris, la nombro de membroj dum la pasintaj kvar jaroj kreskis i.a. ĉar pli da usonanoj eksciis pri Esperanto pere de artikoloj en vaste legataj ĵurnaloj kaj gazetoj. Kvankam tiujn artikolojn verkis nemembroj de ELNA, fojfoje ankaŭ membroj verkis artikolojn, kiuj kreis intereson pri Esperanto. Ekzemple D-ro E. James Lieberman verkis artikolon pri Zamenhof kaj Esperanto kiu aperis sub la rubriko "Doctors Afield" en *The New England Journal of Medicine* (5 nov. 1959), kaj alia artikolo lia aperis en *Clipper Magazine* (okt. 1973), la gazeto de Pan Am. Ellie Stein verkis artikolon por *Joyer Travel Report* (jan. 1973) pri siaj vojaĝoj per Esperanto. Ĉu aliaj membroj deziras verki tiajn artikolojn? Se jes, bonvolu sendi al la Centra Oficejo kopion de la publikigita artikolo.

Mike Donohoo  
Direktoro, ELNA C.O.

## daŭrigo de paĝo 1

to other cultures.

Hopefully, their inevitable progress will change government attitudes much as water alters the shape of rock over time. It will continue until—in the words of my American friend—the world wakes up and realizes the value of having an international language and takes the necessary action finally to give effect to Zamenhof's dream.

Reported in *SFERILO*, May 1991

# ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Oni organizas kontaktejon edzigcele por solecaj geesperantistoj. La dezirantoj devas skribi al: **Borjana Vasilleva, P.K. 74, SOFIO-1220, Bulgario.**

La Dua Afrika Kongreso de Esperanto okazos inter la 27a de decembro 1991 kaj la 2a de januaro 1992 en Benino. Se interesus vin partopreni en ĝi, vi povos ricevi informon kaj aliĝilon de: **UEA Afrika Agado, p/a H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG AMSTERDAM, Nederlando, tel. (31 20) 642 18 53.**

La konata pola vojaĝservo Esperantotur aranĝas turisman ekskurson al grandioza spektaklo: la septembra folklorfestivalo en **Notse, Togolando**. Oni ankaŭ faros flankekskursojn al najbaraj landoj Benino kaj Ebura Bordo. La vojaĝo okazos inter la 1a de septembro 1991 kaj la 15a de septembro 1991. Por informoj: **Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094, BYDGOSZCZ, Pollando, tel (48 52) 510005, telekso 562840 etur pl, telefakso (48 52) 415115.**

Sub aŭspicio de la Kultura Esperanto-Asocio okazos ĉismere la **Internacia Junulara Semajno** en Esztergom, Hungario, inter la 1a kaj la 7a de aŭgusto. La urbo Esztergom situas apud la rivero Danubo proks. 60 km-ojn nordokcidente de Budapeŝto. Okazos Esperanto-koncertoj, kino- kaj video-filmoj, pluraj konkursoj, ludoj, prelegoj pri la Esperanto-movado kaj ĝia perspektivo, tradicia balo, ekskursoj, folklorajtoj... Por aliĝilo kaj informoj: **Kultura Esperanto-Asocio, H-1675 BUDAPEST, Pk 87, Hungario, tel. (36 1) 1288 258.**

Oni okazigos **N.I.A. Esperanto Weekend** dum la 26a kaj 27a de oktobro en Lincoln, Nebraska. Gastprelegos Prof. Ron Glossop de la Universitato de Suda Illinois, Edwardsville. Interesitoj povos ricevi informon de: **N.I.A., RFD 1 Box 29, WILBER NE 68465, Usono, tel. (402) 821-2027.**

La **10-a Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco** okazos sabaton la 21-an de septembro, 1991, en la Holiday Inn ĉe Issaquah, en la ŝtato Vaŝingtonio. Tiu bela urbeto troviĝas dek mejlojn oriente de Seatlo. La kosto estis \$10 (antaŭ la 15a de julio) kaj \$12 (antaŭ la 15a de septembro). Vespermanĝo ĉe Holiday Inn kostos ekstras \$16. Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj. Por pli da informo, kontakti **Les Kerr, 10545 Woodhaven Lane, Bellevue, WA 98004, tel. (206) 455-3069.**

En Slavjanska instituto de preparo de "meneĝeroj" (specialistoj pri ekonomia administrado, merkatesplorado k.s.) **jus estas starigita Esperanto-fako**. La gvidantaro de la instituto projektas vaste uzi Esperanton en sia agado kaj pretas financi elspezojn. Jam komenciĝis koresponda instruado. Estas projektata diversflanka eldonagado. Do oni urĝe serĉas kontaktojn por eventualaj kontraktoj kun similaj organizoj dezirantaj uzi Esperanton, por kunlaboro en lernoprocedo, interŝanĝo de studentoj, komuna agado en la sovetia merkato k.s. Aktuala adreso: **Instituto de Meneĝeroj Esperanto-Fako, SU-343203 SLAVJANSK, Doneckoj obl, abon.jaŝĉik 10, Sovetunio, Rektoro de la instituto: PODDUBNIJ Fedor Ivanoviĉ, Estro de Esperanto-fako: MALACION Aleksandr Sergejeviĉ.**

En novembro 1989 dum kongreso okazinta en Marseille, Francio, **nia lingvo estis balote elektita kiel unu el la laborlingvoj de la verdanaro** ("Green Party"). La 2an de februaro 1991 en Lyons, Francio, okazis la tria kunveno de la francaj verdanaj esperantistoj. Unu el la decidoj estis, peti vian helpon: bonvolu sendi leteron en Esperanto por peti la uzadon de nia lingvo konforme al la baloto. Bonvolu direkti vian leteron al la jenaj adresoj: **Verdanaj eŭropanoj, 288 Bdo. Santa Germain, F-75007 PARIS, Francio; Francaj verdanoj, 50 str. Benoit-Malon, F-94250 GENTILLY, Francio; Ekologia asocio de verdanaj esperantistoj, 10 str. Sempel, B-7790 WARMETON, Belgio.**

Antaŭ unu jaro kaj duono, Rio de Janeiro Esperanto-Asocio organizis la inform-ekspozicion **UTINESPO-n** (Utileco Internacia de Esperanto) kiu estis en pluraj

urboj kaj ankoraŭ vojaĝas tra Brazilo. Nun, **AERJ planas ekspozicion pri infan-desegnaĵoj el la tuta mondo**. Tiu ekspozicio estus okazinta dum februaro de 1991, sed ni ne ricevis sufiĉan kvanton da materialo. Ĉar ni sukcesos akiri bonan lokon por montri ĝin nur se amaso da esperantistoj kontribuos, ni atendas vian partoprenon! Sendu infan-desegnaĵojn sur bona papero, ĉ. 20x30 cm., al: **AERJ, P.O. Box 840, BR-20001 RIO DE JANEIRO, Brazilo.**

Oni lastatempe aperigis serion de **poŝtkartoj pri la frutempa Esperanto-agado en Bjalistoko, Pollando**, la naskiĝurbo de L.L. Zamenhof. Sur la poŝtkartoj (kies eldonkvanto estas nur po 500 ekzempleroj) oni vidas la naskiĝdomon de Zamenhof, ties naskiĝatesto en la lingvoj jida kaj rusa, sinagogo en kiu preĝis lia familio, kaj aliaj dokumentoj kaj fotoj pri bjalistoka Esperanto-agado. Detalaj informoj haveblas de: **"Tomy", Box 351, 15-001 BIALYSTOK 1, Pollando.**

La urba Esperanto-Asocio de Tangshan en Ĉinio, kun 150 membroj, **serĉas alilandajn esperantistojn kaj Esperanto-organizaĵojn** por kunlaborado rilate sociajn, sciencajn, teknikajn, kulturajn, turismajn, ekonomiajn kaj komercajn celojn. Tangshan estas urbo apud la Bohaja Maro, proks. 260 km. for de Pekino, kun loĝantaro pli ol sesmiliono kaj jara industria produktado pli ol \$2 000 000 000-a. Por informoj: **Tangshan Esperanto-Asocio, 3 Hao Xin Xiang, CN-063000 TANSHAN, Hebei, Ĉinio.**

Jam tutmondan famon akiris la eksperimenta bazlerneja klaso de la **Fondaĵo Talento**, kie 12 infanoj ellernis Esperanton tiel, ke ili jam lernas kelkajn aliajn studobjektojn per Esperanto. Post du jaroj de Esperanto-lernado, la 8-jaraj infanoj komencos lerni (ĉi-septembre) la duan fremdan lingvon. Estus tre grave por la eksperimento kaj ankaŭ por la disvastigo de Esperanto, se la duan lingvon instruos al ili denaska parolanto de la koncerna lingvo—pere de Esperanto. Do ni serĉas instruist(in)on, kiu flue parolas Esperanton kaj povus instrui intense la anglan, francan, germanan aŭ hispanan lingvon al la infanoj dum almenaŭ du jaroj. Ni garantios por ŝi/li senpagan loĝadon kaj salajron sufiĉan por normalaj vivo kaj laboro en Hungario. Pedagogoj pretaj entrepreni tiun ĉi unikan taskon bonvolu urĝe skribi al la **Fondaĵo Talento, BUDAÖRS, Pf. 102, H-2041, Hungario; tel. (36-1) 153-7154 aŭ 173-3008.**

de N. Stepanov

[N. Stepanov, kiun legantoj de *Monato jam konas kiel NikSt—akrevida raportanto pri aktualaj aferoj interne de Sovetunio—ĉi tie kaj ekskluzive al Esperanto U.S.A. resumas por siaj usonaj legantoj pri la historio kaj nuntempa evoluado de la Esperanto-movado en sia lando. Opinioj esprimitaj de s-ano Stepanov pri organizoj kaj unuopuloj kompreneble estas propraj al li, kaj pri ilia valideco via redaktoro ne kompetentas juĝi.]*

Oni petis min fojfoje verki artikoletojn pri la sovetia Esperanto-movado por via revuo. Ĉu mi kapablas? Al mi ŝajnas, ke jes. Ja mi jam dum kelkaj jaroj preskaŭ profesie okupiĝas pri historio (kaj ankaŭ pri sociologio) de E-movado en la lando kaj eĉ verkis pri tio kelkajn artikolojn. Do, pro kio oni dubas? Nu, verdire, mi simple ne povas elekti, pri kio mi unue verku. Disaj faktoj, apartaj eventoj, kontraŭdiraj tendencoj, tute diversaj opinioj... (Vidu, ekzemple, *Esperanto*, 1989, n-ro 11, pp. 185-188). Tamen la plej grava, laŭ mi, estas tio, ke oni tute ne povos kompreni la nunan staton de E-movado en USSR sen trarigardo, almenaŭ skiza, de historio de ties evoluo. Pro tio mi komencas jene.

Ĉiu esperantiŝto certe scias, ke la Unua Libro unue aperis en 1887 en Varsovio—sur teritorio de tiama Rusia Imperio, Rusio, aŭ Ruslando, kiel oni tiutempe nomis ĝin, kiu siatempe ne nur estis la “naskiĝloko”, sed ankaŭ la “lulkorbo” de la nova socia movado, havante difinitajn tradiciojn kaj meritojn en ĝia evoluo. Interese kaj tute kompreneble, ke historio de E-movado en la lando (kiel sociokultura fenomeno) ĉiam proksime sekvis cirkonstancojn de socipolitika vivo kaj stato de socio mem.

Do, pro tio oni povus difini kelkajn ĉefajn, tute malsamajn periodojn en historio de evoluo de esperantismo en la lando: I. Antaŭrevolucia periodo de E-movado en Rusio (1887-1917); II. Postrevolucia periodo (konvencie: inter du mondaj militoj); kaj III. Nuntempa (aŭ

postmilita) periodo.

La periodoj fakte ne estis kunligitaj unu kun la alia kaj estis pli la rezulto de “radikalaj ĥirurgiaj operacioj”, de abrupta disŝiro, ol konstanta daŭrigo de tradicioj. Kaj en la E-movado, kiel en guto da akvo, respoguliĝas socipolitika vivo de la vasta landego.

Specifeco de la unua periodo, kiun oni rajte nomas la “rusa” (ĝis 85% el tutmonda esperantistaro tiutempe loĝis sur teritorio de Rusia Imperio), konsistis en tio, ke malgraŭ la reakci-despota reĝimo, ekzistinta en cara Rusio tiutempa, E-movado trovis en ĝi favoran grundon kaj disfloris en multaj centroj de la grandega imperio (precipe—en okcidentaj regionoj de ties eŭropa parto). La ĉefaj eventoj de la periodo: apero de la Unua Libro (1887), de unua adresaro de esperantistoj (1889, Zamenhof), de unua frazaro (1890, A. Grabovski), de unuaj rondetoj, kluboj, societoj (ekz. “Espero”—Peterburgo, 1892), eldonaĵoj (1905, Jalta), unua kaj dua tutrusiaj E-kongresoj (Peterburgo, 1910, Kievo, 1913). Karaktere, ke la humanisma ideo pri amikeco kaj interkompreniĝo inter popoloj, sur kiu baziĝas la movado (tiel nomata “interna ideo”), kaptis unuavice vastajn tavolojn de intelektularo de Rusio kaj, surmetinte sin sur ties batalo kontraŭ despotismo kaj obskurantismo de la reĝimo, rapide disvastiĝis tra la teritorio de la lando. Rusiaj esperantistoj dum la periodo faris multe ne nur por evoluo de la lingvo mem, kaj ankaŭ por evoluigo kaj konfirmado de la “interna ideo”. Ĝuste tio estis la kialo ne nur por la grandaj sukcesoj de la juna E-movado sed ankaŭ por la malsukcesoj kaj fiaskoj. Ĝuste la alta socia idealismo de unuaj esperantistoj kaŭzis ilian firman kunligon kun la movado de adeptoj de Leo Tolstoj. Do, E-movado dum la periodo estis ĉefe la movado de intelektuloj (kuracistoj, instruistoj, verkistoj), kiuj aspiris trovi en la lingvo—laŭ klarigo de Drezen—“certan ripozon de la nube griza socia vivado en la cara despotio”.

La dua periodo de la E-movado komenciĝis post Granda Oktobra Socialista revolucio (1917) kaj evoluis en la juna sovetia respubliko dum unuaj jaroj de sovetia potenco, dum jaroj de rekonstruo de popolmastrumo / ekonomio, dum jaroj de unuaj kvinjarplanoj—ĝis fino de la 30-aj jaroj. Sendube, la ĉefa “evento” de la periodo estis fondo kaj agado de Sovetrespublikara Esperanto-Unio (SEU, 1921-1938). Dum la periodo, sub kondiĉoj de konstruado de juna sovetia asocio, E-movado kreskis kaj rapide evoluis. Ĝi estis tre centrigita kaj iĝis unua vere organizita E-movado en la lando kaj ludis gravan rolon en socia vivo de la lando, en evoluo de ties kulturo, klerigado, scienco kaj tekniko, aligado de vastaj popolamasoj en procezojn de ekonomia, kultura kaj lingva konstruado.

En vicjoj de SEU estis ĉefe “socie proksimaj” personoj (kampanoj, laboristoj, ruĝarmeanoj). Tiel nomataj “socie fremdaj” personoj (“eksuloj” = eksburgoj, oficistoj ktp) estis tute “forpurigitaj” for de vicjoj de l’ Unio. Sendube, la periodo estis la plej grava kaj la plej eventrica ne nur por enlanda, sed ankaŭ por internacia organizita E-movado. En 20-aj kaj 30-aj jaroj sub gvidado de Ernest DREZEN (1892-1937) SEU estis grava faktoro en evoluo de E-movado en tutmonda skalo. Tamen iom post iom sub influo de interna politika kaj internacia situacio la organizita E-movado en Sovetio iĝis ĉiam pli ideologioza, pli politika, pli militista. Treege akriĝis batalo kontraŭ idistoj, neŭtralismo, sennaciismo, unuopuloj en vicjoj de sovetia E-movado. Fine de 20-aj kaj komence de 30-aj jaroj gvidantaro de SEU okupis ĉiam pli dogmajn, sektecajn poziciojn kaj fakte helpis (“sur sia tereno”) al Stalin konstrui kaj plifortigi la maŝinon de perforto kaj amasteroro, kies viktimoj ili mem poste fariĝis.

Grandegaj estis skaloj de reprezalioj kontraŭ sovetia esperantistaro: preskaŭ ĉiuj estis arestitaj, multaj el SEU-

estraranoj estis mortpafitaj kiel spionoj, sabotistoj, teroristoj, aliaj estis ĵetitaj en koncentrejojn kaj malliberejojn. Nur ege malmultaj travivis. Kaj dum preskaŭ 20 jaroj E-movado en la lando fakte ne ekzistis. (Pli detale pri tio oni povas tralegi el libro de U. Lins *La danĝera lingvo*, Bleicher, Gerlingen, 1988 / Moskvo, Progreso, 1990, kaj ankaŭ en *Sennaciulo*, 1990, n-roj 2 kaj 9.)

Dum postmilita (la *tria*) periodo pro rekonstruo de detruita per la milito ekonomio, pro polemiko (kun "partopreno" de I. V. Stalin mem) pri problemoj de lingva konstruo, kaj pro komenco de malvarma milito (vetarmado de nukleaj armiloj, fondo de NATO en aprilo de 1949 ktp)—kondiĉoj por renaskiĝo de E-movado en la lando estis tre malfavoraj. Nur post morto de Stalin (en marto de 1953) komenciĝis procezo de iom-post-ioma "degelo" de la "glacimonto"—la procezo de renaskiĝo de intereso pri Esperanto en Sovetunio kaj en socialismaj landoj.

Ĉefaj eventoj de la periodo: fondo de MEM en novembro de 1953 kaj demonstrado de la praktika uzebleco de Esperanto por celoj de pacbatalo; aliĝo de USSR al UNESKO (aprilo de 1954) kaj ties eliro el periodo de longa izoliteco/izoleco; oficiala partopreno en laboro de la 8-a (Montevideo, Urugvajo, decembre de 1954) Ĝenerala Konferenco de UNESKO, en laboro de UK-oj ktp. Kreskas intereso pri sciencaj problemoj de interlingvistiko kaj de esperantologio (fondo de sekcio pri interlingvistiko sub gvido de *Eŭgeno BOKAREV* [1904-1971]—fakulo pri kaŭkazaj lingvoj kaj esperantologio), pri praktika uzado de Esperanto en scienco kaj teknologio.

Tre malrapide renaskiĝis la organizita E-movado: nur en komenco de 1955 aperis unuaj anoncoj de E-sovetianoj en revuoj *Paco* kaj *Pacdefendanto*; en marto de 1955 aperis anonco de TASS (ŝtata informagentejo de Sovetunio) pri fondo en USSR de unuaj E-rondoj, kaj estis organizita unua "iniciativa grupo" (Litovio, majo de 1956) por kunordigo de E-movado en skalo de la tuta lando. Tamen certe la plej granda evento estis VI-a tutmonda festivalo de junularo kaj studentoj en Moskvo en aŭgusto de 1957, kiu estis turnopunkto en evoluo de la postmilita E-movado en Sovetunio.

Responde al petoj de eksterlandaj esperantistoj sovetia registaro decidis "prepari" propran "E-taĉmenton". Por la celo oni eĉ "importis" el Estonio unu maljunulon por instrui Esperanton al studentoj-volontuloj. Post la festivalo burokratoj "dankis" junularon kaj ordonis al ili reveni al siaj hejmoj kaj laŭeble plej rapide "forgesi" pri Esperanto. Tamen, jam ensorĉitaj per la zamenhofa "interna ideo", la novbakitaj esperantistoj ribelis kaj rifuzis sekvi la ordonojn. Poste la grupo iĝis kerno de organizita E-movado en la lando.

Rapide naskiĝis E-klubo en diversaj urboj kaj regionoj de la lando (ekzemple—Moskva Internacia E-klubo ĉe centra Domo de Medicinistoj, 1959), kiuj rapide unuiĝis en SEJM-on (Soveta Esperantista Junulara Movado). La lasta organizis multflankan laboron: ĉiujaraj E-tendaroj, E-klubo kaj E-rondetoj, aperigo de informbultenoj, tradukoj kaj originalaj verkaĵoj ktp. Oni aperigis plenajn "Rusa-Esperantan" (1966) kaj "Esperanto-Rusan" (1974, 1982) vortarojn. En 1962 ĉe SSOD (Unio de Sovetaj Asocioj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj) estis organizita Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj.

Kajen marto de 1979 estis fondita ASE (Asocio de Sovetaj Esperantistoj). Dum 10 jaroj de sia ekzisto ASE ne sukcesis plenumi ĉiujn siajn taskojn pro burokratismo, konservatismo kaj pasiveco de ties multaj estraranoj. Verdire, oni suspektis, ke ĝi estis "organizita" ne por evoluigo de la movado sed tute male—por bridi kaj bremsi ĝin. Do, kvankam poiomete kreskante, la E-movado en la lando ĝenerale vegetis kaj stagnadis, ĝuste kiel la vivo mem.

Dum nuna periodo de "perestrojko kaj glasnosto" en la movado ekkreskis ribelfortoj—fine de 1988 el ASE foriris naciaj E-Asocioj de ĉebaltaj respublikoj (Estonio, Litovio, Latvio), kiuj renaskigis agadon de propraj (antaŭmilitaj) E-Asocioj. Ankoraŭfoje mi volus rememorigi pri granda simileco de vivo en la lando kaj de loka E-movado. Irante en la socio, perestrojko tute respeguliĝas ankaŭ en vivo de Esperantujo. Tamen, ofte la E-perestrojko malfruas kaj akceptas

karikaturajn formojn. Kiam en januaro de 1989 la E-popolo "ribelis" kontraŭ "ASE-burokrataro", elekstere tio montriĝis same "progresiva" kiel siatempe la Granda Oktobra Socialista revolucio, kiu eksplodis en la lando la 7-8-an de novembro (novstile) de 1917. Tamen, atentemaj okuloj jam tiutempe vidis, ke en la "ribeło" partoprenis la samaj personoj, kiuj estris ASE-on. La samaj eks-junuloj, kiuj siatempe (1956-1957) entuziasme fondis SEJM-on, kiuj pli frue propagandis pacon kaj amikecon, toleremon kaj interkompreniĝon inter (diversaj) popoloj, transformiĝis en ekstremistoj, ĝisostaj fanatikuloj, kiuj praktikas maltoleremon kaj eĉ malamom kontraŭ "malamikoj", kiujn oni tuj trovis inter siaj eks-kunlaborantoj. Estis tre interese rigardi ilin elekstere, kiam la grupeto de E-"ajatollahoj" ĵetis sin por dividi postenojn, "portfelojn" ktp. Blindigitaj pro la entuziasmo kaj pro la malamo, ili tute forgesis pri siaj celoj, kiel esperantistoj, tute masplikis la "internan ideon" de esperantismo kaj zorgis nur pri siaj ambicioj kaj personaj "profitoj", pri memkonfirmo, pri plifortigo de sia propra kulto.

Kaj kiel ofte okazas en vivo, neadon de unu ekstremismo oni ŝanĝis je mala ekstremismo; tamen, kiel oni nun tre bone scias, naturo de totalismo ne ŝanĝiĝas kune kun ŝanĝo de ties signo. Kaj nun oni povas vidi, kiel ekstendaranoj, kun granda peco de anarkiismo, transformiĝas mem en eĉ pli aĉan E-burokrataron (!), poresperantajn "fundamentalistojn" (fanatikulojn), kaj kvazaŭplurismo iĝas je fanatika maltoleremo al alipensado kaj al alikonduto. Viva E-agado transformiĝis je senĉesa baraktado en t.n. "organizaj problemoj", plejparte memfaritaj. Intrigoj, klaĉoj, kvereloj, malamo kontraŭ "burokratoj" de eksa (ASE (eĉ du jarojn post ties disfaliĝo), kontraŭ aliuloj, kontraŭ "fremduloj"—jen kion oni havis kiel idean bazon por varbi amikojn. Kaj ĉiujn ĉi kontraŭproduktajn "valoraĵojn" oni penis inokuli al novbakita esperantistaro.

Ĝuste kiel en la "ordinara" (eksteresperantista) vivo, tuj ekkreskis t.n. "centrofugaĵ" tendencoj. En E-kampo ili estis eĉ pli fortaj kaj eĉ akceptis pli karikaturajn formojn. Tuj ekaperis



memstaraj lokaj mikro-asocioj: en Baltio, en Belorusio, en Ukrainio (tie aperis eĉ du memstaraj kaj je certa grado antagonismaj asocioj: UREU—surbaze de KARE-klubo, kaj UkrEA—surbaze de klubo “Ora Pordego”, i.a. kun propraj informbultenoj), en Uralo, en Siberio kaj Malproksimoriento. En Kaŭkazo (inter Armenio kaj Azerbajĝano) iras vera milito, kaj ĉiu flanko varbadas aliancinojn de sia “justa afero”. Fakte en la situacio disfalo de la unueca movado estis tute natura. Lokaj organizaĵoj en diversaj regionoj tuj komprenis, ke ili havos neniun utilon de novnaskita SEU (kiel oni nomis sian novan organizaĵon anstataŭ disrompita ASE), kaj ĉesis fordoni siajn financajn rimedojn, kiel oni diras, “por nutri propran E-burokrataron”, pagi por ties eksterlandaj vojaĝoj ktp. Ili koncentris sian agadon lokanivele, des pli, ke por tio jam aperis realaj eblecoj. Kaj ĝuste kiel nun disfaliĝanta komunista partio, perdanta sian fincan subtenon, komencis konsumiĝi kaj sufokiĝi ankaŭ la organizita E-movado. Rezulte de la kurado de l’ eventoj, de la sektaneca konduto de “gvidantoj” ktp. de la movado, defalas ne nur novbakitaj sed ankaŭ malnovaj esperantistoj. Al ĉio ĉi aldoniĝas ankaŭ ankoraŭ unu grava (kaj malbona por la plua evoluo de E-movado en la lando) faktoro: post komenco de periodo de “perestrojko kaj glasnosto” (kiel ajn ili estu malsinsekvaj kaj kontraŭdiraj) antaŭ malluma kaj rigidiĝinta de malklereco kaj timo loĝantaro, subite aperis vasta elekto de agadkampoj, de sferoj por kreado, eblecoj por vojaĝi, labori ie ajn, legi, spekti ion ajn ktp. Kaj en tiaj kondiĉoj lernado de Esperanto (kiu antaŭ la periodo estis natura rifuĝejo por intelektuloj kaj alipensuloj) ĉiam pli multe iĝas “ekzotika” okupo, ol iam pli antaŭe.

Kaj tiuj estas tute objektivaj procezoj, kiuj malutilas al disvastigo de Esperanto (ĉar preskaŭ 95% el tiuj, kiuj volus veturi ekzemple eksterlanden por labori nun lernas anglan lingvon), kaj se oni ne komprenos tion ĝustatempe, E-movado en la lando (kaj ne nur en organizita formo) povas tute perdi sian perspektivon. Kaj senpasia statistiko klare montras tion: se en eksa ASE estis


pli ol 200 E-klubo, do nun en SEU oni povas kalkuli 60-70 klubojn kaj ne ĉiuj volonte kaj ĝustatempe pagas kotizojn. Pro tio dum du pasintaj jaroj (1989-1990) oni povis aperigi nur tri numerojn de siaj informbultenoj (pliparte ruslingve), por kiuj oni ne sukcesis ĝis nun (meze de marto 1991) pagi, kaj kvankam nun oni povas tute simple kaj oficiale registriĝi kiel tutunia organizo, oni ne povas fari tion, ĉar por la registrado oni postulas grandan imposton—5000 rublojn, kio estas katastrofa por SEU-kaso. Por savi la fincan sanon de SEU oni lanĉis specialan fonduson “REGISTRIĜO”... Kaj SSOD ja havis monrimedojn (ankaŭ en t.n. “harda” valuto), dediĉita speciale por ASE-financado, kaj “pli malvarmaj kapoj” dum “historia” kunsido en januaro de 1989 (kiam oni disfalis ASE-on) sobre penis memoriĝi al “ebriigitaj pro libero” gesamideanoj ne konduki sin tiom infanece, sed vane... Nun oni rikoltas rezultojn de tiu ĉi senrespondeca konduto.


Fine de 1990 (la 21an ĝis 23a de decembro) en Moskvo okazis la 9-a landa kongreso de SEU. Estis reprezentitaj 56 el 70 kluboj-membroj de SEU. Multe da kunsidoj, multe da babilado kaj t.n. “organizaj aferoj”. Tamen, kvankam laboro de SEU-prezidio estis agnoskita kontentiga (laŭ mi, tute vane), tamen laboro de SEU-Estraro—tute ne kontentiga. Estis elektitaj novaj estraranoj, el kiuj nur kelkaj el malnovaj gvidantoj trafis novan Estraron. La novelektita prezidanto de SEU, *Viktoro Aroloviĉ* (naskiĝis la 9an de marto 1946, doktoro-kandidato de fizikaj-matematikaj sciencoj; esperantiĝis en 1966; individua membro de UEA ekde 1976; en 1970-74, 1976-79—vicprezidanto, en 1976-79—prezidanto de SEJM; en 1979-1989—estrarano de ASE; en 1989-1990—vicprezidanto de SEU), kvankam “eterna” estrarano de ĉiuj E-gvidorganoj, ne apartenas al ilia ekstremisma alo. Lin distingas kaj prudento kaj alta skrupulemo, kaj ankaŭ—adepteco al la “interna ideo” kaj ĝenerale al ideoj de “verda movado”. I.a., li en malnova prezidio respondecis pri varbado de individuaj membroj kaj la agadon oni pritaksis tute sukcesa, ĉar nun en SEU estas entute pli ol 400 individuaj membroj. En sia inaŭgura raporto li i.a.

